★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Teĥnikisto Ludvík Očenášek (1872 – 1949) kaj lia neostenta patriotismo

En nuntempa Ĉeĥa Respubliko oni preskaŭ ĉesis akcenti edukadon de junularo al patriotismo. Ofte oni la vorton patrioto ironizas, eĉ mokas. Ĉu la patriotismo estas senenhava parolaĉado, skandado de sloganoj, svingado flagaĉojn kaj netoleremo al aliaj nacioj kaj eksterlandanoj? Tute ne! Ekzemplo de ĉeĥa teĥnikisto Ludvík Očenášek, kiu estis agema kaj disciplinita membro de sporta organizo Sokol, partoprenanto en kontraŭhabsburga kaj kontraŭnazia rezistaj movadoj, eblas observi pozitivan influon de patriotismo sur konduton de talentita homo, laborema kaj persista entreprenanto kaj inventinto, kiu spite de malfavoraj kondiĉoj progresis de riparadoj de pluvombreloj kaj bicikloj progresis ĝis sukcesaj eksperimentoj kun raketoj kaj kiel unu el du ĉeĥoj okupis sian lokon en Halo de Famo de Pionieroj de Kosmoflugoj en Usono.
Ĉeesta programo, ĝi estos registrata

**Prelegonto:** Oldřich Arnošt Fischer

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 13-an de marto 2024 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- Nova libro de Oldřich Arnošt Fischer: **El Mirinda Mondo de Kaktoj (*Cactaceae*)**. En la libro oni trovos kolorajn fotojn de 160 kaktaj specioj kaj koncizajn datumojn pri iliaj naturaj trovlokoj, adaptado al malfavoraj vivkondiĉoj. signifo, historio de kakta kultivado kaj personecoj, kiuj okupiĝas(is) pri la kaktoj. Kaktista vortareto kun kelkaj esperantigitaj sciencaj nomoj estas aldonita. Kosto 320 CZK + sendokostoj.
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 **Universala kongreso**, Aruŝa, Tanzanio. La plej favora prezo nur ĝis jarfino.
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 La 73. konkreso de Kristana esperantista ligo internacia, Vác, Hungario73.
- Literatura Konkurso Esperanto ligas homojn**.** Limdato 31-an de JULIO

★

## Cetera programo en marto

La 20-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Skajpo
La 27-an *Ankoraŭ ne agordita*, Klubejo Hybešova 65a, Brno
Mi petas vin, ke vi jam pripensu, kiel vi povas kontribui al la programo dum venontaj monatoj, precipe en marto. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Ne forgesu, ke nia programo povas esti nur tia, kiun mi ĝin preparos.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)